

KOSMOS

Revuo de Martinus-Instituto



Martinus-Instituto en Kopenhago en decembro

N-ro 2, 2024

Esperanto

Enhavo	
La Martinus-movado – ĉu ĝi havas nomon?	2
La nomo Esperanto - el la Leteroj de Zamenhof	3
La kristnaskaj kandeloj	4
Pri Vakcinoj	7
UEA aktiva ĉe UN	9
Esperanto - la internacia mondlingvo - parto 2 el 3	10
Ivo Lapenna forpasis la 15-decembro - La naskiĝtago de Zamenhof.....	16
Rezolucio de la 109-a Universala	17
Informado pri la Martinus-instituto.....	18



La Martinus-movado – ĉu ĝi havas nomon?

Demando: Kial la “Martinus-movado” ne havas konvenan nomon, povas esti karakterizata samkiel aliaj spiritaj movadoj, kiel Teosofio, Antroposofio, Atestantoj de Jehovo ktp.?

La Spirita Scienco de Martinus estas nek Unuiĝo nek sekto

Martinus respondas: Ĉirkaŭ mia spirita laboro neniel en iu ajn formo ekzistas nek iam ekzistos asocia, sekta aŭ religia formiĝo kun statutoj kaj reguloj, kun sakramentoj kaj baptaj ceremonioj k.s. Tiel ne troviĝas iu ajn “movado” al kiu doni nomon.

Ke mia spirita laboro ricevas pli kaj pli da interesitaj studentoj kaj legantoj ja ne signifas, ke pro tio eblas nomi ilin organizita religia komunumo. Same malmulte oni konsistigas paroĝon, sekton aŭ eklezion, per studado aŭ legado de sciencaj verkoj de iu ajn alia verkisto. Mia tuta spirita laboro celas nur esti instruado aŭ manifestado de scio en formo de analizoj de la mondbildo kaj per tio reveli la premisojn de la proksimula amo aŭ la humana vivmaniero aŭ sinteno, kiu identigas la homon kun la mondpaco. El tio sekvas ke mia laboro, pro sia intelekta strukturo, neniam ajn povos fariĝi religio bazita sur kredo. Male, ĝi povas ekskluzive fariĝi nur lernejo, edukejo, institucio por gvidado kaj edukado pri vivscienco, per kiu la studento povas kontaktiĝi kun sia dieca transformiĝo de besto al “homo laŭ la bildo de Dio simila al li”.

Tiu mia laboro sekve estas por absolute ĉiuj verserĉantoj tute sendependa de iu ajn religio, nacio aŭ raso al kiu ili apartenas. Miaj analizoj estas samkiel ĉiu ajn alia scienco absolute neŭtralaj kaj nepartiaj.

Ĉar mia spirita laboro do estas manifestaĵo de, kaj gvidado en la eternaj analizoj de la mondbildo, ĝi tute simple karakterizeblas kiel kosma scienco, kiu siavice egalas al spirita scienco, samkiel la studentoj de tiu spirita scienco esprimeblas nur kiel spiritaj esploristoj. Esprimi mian spiritan laboron kaj ties interesitajn esploristojn per aliaj terminoj povas esti nur esprimo de plena miskompreno.

*Traduko Henning Sato von Rosen. Kontaktbrev 21, 1951. Temolibro 2, respondo, n-ro-26.
Artikolo-id M3026*



La nomo Esperanto - el la Leteroj de Zamenhof

Al s-ro K. en Bogučar. (ov. 11-33)

Mi jam respondis al Vi per letero; sed ĉar tiun saman demandon mi ricevis ankaŭ de kelkaj aliaj personoj, mi donos pli detalan respondon tie ĉi. Ŝanĝi la nomon de nia lingvo nun estus tre malutile, ĉar la publiko pensos, ke ĝi estas ia nova lingvo kaj tiel, anstataŭ fortigi nian aferon, ni ĝin nur malfortigus. La plej granda parto de la publiko estas tute indiferenta por ĉia nova afero, la plej gravan aferon ĝi lasas sen atento, se tiu ĉi afero ne fariĝis ankoraŭ sufiĉe moda, kaj la plej sensencan bagatelon la tuta amaso de l' mondo baldaŭ akceptas, se ĝi nur estas en modo.

Tiun ĉi karakteran econ de la publiko ni devas ĉiam bone memori, se ni volas, ke nia afero sukcesu. Se la publika amaso konstante aŭdacos la nomon de nia afero, ĝi ekmemoros ĝin, ĝi kutimos ĝin respekti kiel aferon fortan kaj ĉiam pli fortiĝantan, kaj pli aŭ malpli frue la plej indiferentaj aliĝos al ni; sed rekte kontraŭan rezulton ni atingos, se ni ofte ŝanĝados la nomon de nia afero, kun ĉiu nova ŝanĝo ni devos denove komenci la batalon kontraŭ la indiferenteco, kaj en la okuloj de la publiko, kiu longan tempon konas nur la nomojn antaŭ ol ĝi decidus ekkoni la aferojn, ni restos ĉiam malfortaj.

Kian nomon nia afero havos, estas tute egale, ĉar la nomo estas nur signifa sono, kondiĉa signo sen graveco interna; sed la nomo estas nia standardo, per kiu ni povas diferencigi amikojn de malamikoj, kaj kiu montras al la publiko la unuecon de niaj diversaj batalantoj en diversaj lokoj; kia ajn la standardo estas, ĝi devas resti ĉie kaj ĉiam tiu sama, por savi nian aferon de miksado kaj konfuzo. Se ni volus intence elpensi ian nomon por nia lingvo, ni povus sendube trovi multe pli konvenan kaj pli logikan nomon ol "Esperanto"; sed la nomo de nia " lingvo ne estas elpensita, kaj jen estas ĝia historio: Eldonante la unuan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon "Esperanto"; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata la lingvo internacia proponita de "Esperanto".

Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon "lingvo de Esperanto" (die Esperanto-Sprache): aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple, "la lingvo Internacia", "la internacia"), montris sin neoportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub "lingvo internacia" oni povas egale bone kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto "Esperanto" (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton "Esperanto", ekzemple "la afero Esperanto", "skribi en Esperanto" k. s. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo.

Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo "Esperanto" estas per si mem tute senlogika; sed en signifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon? La plej grava estas tio, ke sub tiu ĉi nomo nia afero estas jam iom konata en la mondo, dum alia nomo estus por la publiko tute nova, kaj la fruktoj, kiujn ni jam gainis, estus nun perditaj. Estas necese, ke ni ĉiam ripetadu unu nomon al la oreloj de la publiko, por ke ĝi kutimu je la nomo kaj respektu la konstantecon de afero. "Esperanto" estas nun nomo de afero kaj ne de persono; "Esperantisto" nun tute ne signifas "Zamenhofisto", sed kontraŭe, Zamenhof estas unu el la Esperantistoj. *Zamenhof*



La kristnaskaj kandeloj

Martinus

1. Fizikaj vintroj kaj someroj

La vintromezo estas la plej malluma tempo de la jaro. Kaj aparte sentebla estas la mallumo kune kun la malvarmo kaj vento, la frosto kaj neĝo, pluvneĝo kaj koto ĉi tie sub niaj latitudoj. Sed la vintro ja ankaŭ estas simbolo de ĉiuj malkonstruantaj fortoj, eĉ de la morto mem. Ni vidas, kiamaniere la vivo malflugas jam aŭtune. La verdaj arbaroj velkas. La flortapiŝoj de la herbejoj estas for. La granda legio da kantbirdetoj ankaŭ estas for. La silento aŭ senviveco kaj la mallumo regas tie, kie antaŭe himnoj por la glorado de la vivo el miloj da etaj gorĝoj plenigis la sunumatajn kampojn kaj arbarojn, ĝardenojn kaj parkojn per sia vivoplena tonado. Nun neĝo kaj glacio dominas la altan nordon. Tiuj fenomenoj estas la kulmino de silento kaj malvarmo de la morto. Kaj tamen ambaŭ atestas, ke la morto ne ekzistas. Neĝo kaj glacio estas rezultoj de la vivfunkcioj de la universo. Ili estas produkto de kreado. Same kiel ili povas kreiĝi, tiel ili ankaŭ povas dissolviĝi kaj denove rekreiĝi. Kaj ni vidas ĝuste, ke la vintro kreiĝas per malvarmo kaj mallumo, dum la somero kreiĝas per varmo kaj lumo. Per la spirita scienco ni ekvidas, ke la vivantaj estuloj havas eternan vivon. Tiu eterna vivo ankaŭ formiĝas, laŭ mensa vidpunkto, kiel alternantaj mensaj vintroj kaj someroj, kio signifas respektive: mensa lumo en la animo kaj kondukmaniero kaj mensa mallumo en la animo kaj kondukmaniero. Kaj la homaro ĝuste ĉi-tempe troviĝas en tia kosma vintra epoko.

2. La “kreinto” malantaŭ la kreitaĵo havas eternan vivon

Pro tio ke ni tiel havas eternan vivon, nia nuna surtera vivo ne estas, kiel oni ordinare supozas, la sola fizika vivo, kiun ni travivis aŭ travivos. Ĝi nur estas ero de ĉeno el antaŭaj surteraj vivoj travivitaj kaj estontaj teraj vivoj travivotaj.

Tion, kion ni vidas kiel malvarmon kaj silenton de la morto, do ne estas iu vera morto aŭ silento. Ambaŭ estas kreitaj kaj estas du diversaj vivoformoj. Sed ekzistas pli ol tiuj du vivoformoj: La somero kaj vintro. Ekzistas io, kio travivas la someron kaj la vintron. Kio estas tiu “io”? – Ne povas esti la vintro aŭ somero, ĉar, kiel ni menciis, tiuj ja estas kreitaĵoj. Kaj kreitaĵoj neniel povas “travivi”, same kiel ili ankaŭ ne povas “krei”. Ekzistas do io, kio situas super la kreitaĵo. Tio neniel povas esti io alia ol “la kreinto” mem. Ja kiel povus okazi logika kreado sen pensanta kaj scianta kreanto? – Ĉiu ajn kreaĵo, kiu ne estas akcelita de scianta aŭ konscia kreanto, neniel povas konsistigi logikan kreaĵon. Ĝi neeviteble iĝus kaoso. Kiamaniere povus okazi logika kreado, se ne estus inteligento, se ne estus planado, se ne estus io, kio gvidus la kreadon? – Sed kiamaniere povus ekzisti inteligento aŭ kre-kapabloj, se ili ne estus ĝuste ecoj de kreanto? Kiu do estas tiu kreanto? – Nu, tiu demando ne estas tro malfacila por respondi, ĉar nur povas esti tiu “io”, kiun ni nomas “vivanta estulo”. Troviĝas do vivanta estulo malantaŭ la kreado de vintro kaj somero per la naturo. Kaj estas tiu estulo, kiun ĉiuj homoj ĉie en la mondo ĉiu laŭ sia maniero kaj idearo kultis kaj adoris.

3. La amo estas la baza tono de la universo

Sed kial Dio kreas tiun vintron, tiun limigon de la kreitaĵo, tiel ke ĝi preskaŭ impresas kiel senviveco? – Ĉu tio ne ĝuste celas montri al la homoj, ke la morto ne ekzistas, kaj ke la vivo tiel transvivas ĉiun formon de tio, kion ni nomas “la morto”? – Kaj ĉu ne ĝuste tie la homoj havas sian plej grandan timon? – La ege plej granda parto de la homoj altgrade timas “la morton”, kiu laŭ la kredo de multaj signifas totalan finon de ilia propra traspertado de la vivo. Se tiel estus, absolute ne estus ia senco aŭ logiko en tio, ke fizika estulo havu tian unuopan fizikan vivon. Ĉio estus kaoso kaj maljusteco. Jes, la fizika ekzistado estus eĉ kulminanta infero en la nuna fizika surtera vivo de iuj homoj, dum aliaj havus respondan lumantan paradizon dum sia nuna fizika surtera vivo. Kiel tio povus esti justa aŭ esprimo de la absolute plej alta amo? – Kiu diras, ke la vivo devas esti esprimo de la amo plej alta el ĉiuj? – Tute preteratentante, ke la homaro eksciis per la principo de la mondoliberigo kaj la mondaj religioj sekvintaj el ĝi, ke Dio estas amo, kaj ni estos evoluigataj ĝis ni ankaŭ estos “la bildo de Dio kaj simila al li”, ĉiamaniere montras la vivo mem, ke la amo estas la baza tono de la universo. Tio fariĝas fakto per tio, ke absolute ĉiuj kreoprocezoj de la naturo finrezulte estas utilo kaj beno al ĉiuj vivantaj estuloj.

4. La nefinaj homoj

Kiam la homoj ne komprenas tion, la kaŭzo estas, ke ili tro multe prijuĝas la nefinitajn kreoprocezojn de la Dieco kiel finitajn kreitaĵojn. Estante neperfektaj, tiuj nefinitaj kreitaĵoj kompreneble ankoraŭ ne povas plenumi la aman celon, kiun ili laŭintence plenumos, kiam ili estos finkreitaĵoj. Al tiuj nefinitaj kreitaĵoj apartenas ekzemple la kreado de la teraj homoj. Ke ili ne estas finitaj, montriĝas ĝuste per ilia rilato al siaj proksimuloj. Homoj, kiuj venĝas kaj malamas, murdas kaj mortigas, kalumnias kaj persekutas sian proksimulon, iĝas enviaj kaj ĵaluzaj, ofendiĝas kaj ne povas pardoni, havas profesion ĵaluzon kaj emas vivi je la kosto de aliaj, estas senindulgaj kaj brutalaj, volas subpreni, regi kaj komandi aliajn homojn, estas nefinitaj homoj. Ke la surtera homaro tial vivas en milito, murdado kaj detruado de la fizika estado de aliaj estas nature. La pli fortaj altgrade vivas je la kosto de la pli malfortaj.

5. Kian celon havus la evoluprocezo, se la estuloj ne estus eternaj?

Tiu mondo fina aŭ infera stato de la homoj do estas demando de kreado aŭ evoluo. Ĉu ni ne ankaŭ vidas, ke tia evoluo okazas? – Iuj homoj multe pli proksimiĝis al la granda celo, esti en “la bildo de Dio kaj simila al li”, ol aliaj. Eblas al ni vidi, ke la homaro evoluis de tute malsupre kiel simi-homo ĝis la moderna kulturhomo. Kian celon havus tiu evoluo, se ne estus la samaj estuloj travivantaj ĝin? – Sed ĉar estas la samaj homoj, kiuj travivas la evoluon, la reenkarniĝo aŭ la renaskiĝo ĉi tie tiel fariĝas realo. Tiu “morto”, kiun devas trairi ĉiu homo, ja entute ĉiu estulo, do ne estas vera aŭ absoluta morto. La vivo de la estulo estas same kiel la vintro kaj la somero rezulto de kreado en la substanco aŭ la materio. La fizika organismo de estulo estas nenio alia ol kreita fenomeno. Ĝi absolute ne povas esti la kreinto. Ĝi povas pere, sed la kreinto daŭre plu vivas. Li do povas naskiĝi denove en kreita organismo kaj pere de tiu pluvivi sur la fizika nivelo, ĝis ankaŭ tiu organismo estas eluzita, maltaŭgiĝinta. Li tiam povas denove naskiĝi en novan organismon kaj tiel plu daŭrigi, ĝis li perfektigis, identiĝis kun la baza sono de la universo, la amo, kaj per tio fariĝos “la bildo de Dio kaj simila al li”.

6. “La regno de Dio” aŭ “la regno de la ĉielo”

Atinginte tiun staton, la homo ne plu estos kreanto de mallumo kaj sufero al aliaj homoj, sed estas centprocente utila kaj bona al vivantaj estuloj. Socio el tiaj homoj nature nur povas krei diecan ekzistadon laŭ “la bildo de Dio kaj similan al li”. Kaj estas tiu estonta monda regno sur la tero, kiu esprimiĝas per “la regno de Dio” aŭ “la regno de la ĉielo”. Tiun regnon Kristo aludis, dirante: “Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo”. La dirita dia regno ankaŭ hodiaŭ ne estas el ĉi tiu mondo, kvankam ĝi multmaniere kreskas pli kaj pli en la fizikan mondon de la homaro. Estas vere, ke en certaj kampoj la homoj kreas la mortigajn froston kaj malvarmon, glacian kaj neĝon de la mensa vintro. Ankaŭ en la fizika vintro de la naturo regas glacio kaj malvarmo kaj aliaj mortigaj fenomenoj, sed

tio ne povas malhelpi la printempon alveni kun sia sunluma, varmiga kaj viviga ecaro aŭ klimato. Kaj tiu varmiga kaj viviga klimato de la printempo, kiu normale kondukas la vivon en abundon da suno, lumo kaj varmo, estas rebrilo de la ĉioĉirkaŭbraka radiado de la Dieco.

7. Diablokonscio

Same kiel la fizikaj vintroj estas nur provizoraj, mallongdaŭraj mallumepokoj en la fizika vivo de la terhomoj, tiel ankaŭ la mensa vintro estas preterpasa mallumepoko, sed tie estas inverse. Dum la homo povas travivi 70-100 fizikajn vintrojn dum unu surtera vivo, necesas multaj surteraj vivoj por sukcese trapasi la mensan vintrozonon. Do estas tia vintra epoko, kian travivas la homaro nuntempe, en la formo de tiu vivado en la tago de juĝado aŭ je la mondfino, kun ties mondmilitoj, atomaj aŭ nukleaj bomboj kaj aliaj inferaj maŝinoj. Tiu mensa vintro estas tiel kruela, ke oni oni ne povas nomi ĝin “besta”, ĉar la mortigaj metodoj kaj motivoj de la bestoj estas preskaŭ mikroskopaj kompare al la kapableco de la homoj en la kampo de murdado, detruado, dolorigo kaj suferigo. Kaj en la pure “homa” kampo la konscio de la homoj ankoraŭ multtrilate estas nur mikroskopa kompare al ilia “besta” kapableco. Kaj ni tial devas esprimi tiun mensan disvolvan teknikon kiel “diablokonscion”. La homoj do grandkampe vivas en diablokonscia epoko. Tiu epoko do estas kosma vintroprincipo, kiu ankaŭ estas preterpasa, kvankam tion oni devas rigardi laŭ kosma perspektivo.

8. La kristnasko estas kosma signo de printempo dum kosma vintro

Ke tiu ne pludaŭros, videbliĝas per la fakto, ke oni jam ekvidas multajn signojn de printempo, eĉ komencas senti ĝiajn glacien kaj neĝon cedi al degeligantaj aŭ fandantaj printempaj ventoj. Unu el tiuj printempaj ventoj estas tiu lumo kaj varmo en la koroj, kiu eklumas en la fizika vintromeza malluma tempo kaj igas la homojn kvazaŭ ori la mondon dum tiu mallonga epoko, kiun ni nomas la kristnaskaj festotagoj. Milionoj kaj milionoj da lumoj estas ekbriligataj kaj reflektas ore kaj arĝente glimantajn kolordekoraciojn kaj kristnaskajn arbojn. Kaj estas ankaŭ rebrilo de tiu printempa lumo de estonta somera regno de la lumo, kiu rebrilas en la multaj tunoj da donacaj pakaĵoj, leteroj kaj amikaj salutoj, sendataj el ĉiuj anguloj de la kristana mondo sur la tutan teron al parencoj kaj amikoj. Ankaŭ estas la varmiga lumo de Betlehemo, kiun oni sentas tra ĉiuj tiuj multaj filantropiaj karitataj aranĝoj por tiuj, kiuj sidas en mizero kaj malfeliĉo, en malriĉeco kaj mallumo. La proksimeco de Dio estu sentata meze de la mortepoko de la vintro. Estas, kvazaŭ ĉiuj volas esti bonaj dum tiu epoko, precipe la kristnaskan vesperon. Neniu dum la sankta vespero malsatu nek frostu. Ĉiuj volas esti bonaj al ĉiuj.

Sed la spirito de Dio povas revelaciigi nur per la koro kaj la intelekto. Ĉar estas tiom da koroj, kiuj dum la kristnaska tempo ekbriligas sian kosman lumon kaj tiel eklumas en la mallumo per sia komenciĝanta amkapablo, ili kombinite fariĝas kvazaŭ lumanta kosma iluminaĵo. Per tiu kosma iluminaĵo aŭ ama atmosfero ĉielaj estuloj povas veni pli proksimen al la tero kaj en pli grandaj aroj, ol cetere okazas dum la griza ĉiutageco. Kaj tian ĉielan aron da anĝeloj travivis la malriĉaj paŝtistoj sur la kampoj apud Betlehemo. Ĉi tie estis pureco en la koroj kaj tiu sento de la spirito de Dio, kiu videbligis al la malriĉaj paŝtistoj la ĉielajn estulojn kaj konigis al ili la dian mesaĝon pri la monda paco kaj la granda difavoro al la homoj, la granda kosma somero aŭ la regno de Dio, venontaj al la homoj.

9. Ĉiu homo, kiu havas amon al sia proksimulo en siaj koro kaj konscio, estas Dieca kristnaska kandelo en la kosma vintro

Kaj tiel ĉiu, kiu elkore sentas amon al sia proksimulo kaj volas krei ĝojan kristnaskon en lia koro, estas kristnaska kandelo ekbruligita de Dio por tiu proksimulo. La principo de multaj milionoj da brilantaj kristnaskaj kandeloj kun ilia rebrilado de ore kaj arĝente glimantaj dekoracioj aŭ ornamaĵoj en la vintronokta mallumo estas donaco de la ĉielo. Ili estas dia simbolo de la celo de Dio pri la homaro. Ĉiu flamigita kristnaska kandelo estas simbolo de homo. Same kiel la ekbruligitaj fizikaj kristnaskaj kandeloj helpas ilumini kaj festigi la vivon de la homoj interne kaj ekstere, sur stratoj kaj placoj, en laborejoj kaj en hejmoj, sur kristnaskaj arboj kaj aliloke ĉirkaŭ ni en la vintra

mallumo, tiel ĉiu homo, kiu havas amon al la proksimulo tiel en la koro kiel en la intelekto, estas kristnaska kandelo flamigita de Dio en tiu kosma vintro, tiuj mondoĉiuj tempoj, en kiuj vivas ĉi-tempe la homaro.


10. La voĉo de Dio al la homaro hodiaŭ

Kaj estas tiu ĉiela lumo en la koroj, kiuj plenumas la promeson de la anĝeloj pri paco sur la tero kaj la sekvanta el ĝi difavoro por la homoj. Kaj same kiel la flamigitaj fizikaj kristnaskaj kandeloj de la homoj aperas en multega nombro, iluminante kaj vivigante iliajn fizikajn vivojn dum la vintra mallumo, tiel ĉiu unuopa homo sur la tero peni ekflamigi sian amofajron kaj kiel vivanta kristnaska kandelo de la Dieco brilu kaj disradiu la lumon kaj varmon el sia koro sur ĉiujn kaj ĉion. Tiu dia lumfonto de amo, tiu ĉiela iluminaĵo, kiun tiam elradios la kunigita homaro, estas la naskiĝo de la regno de Dio sur la tero. Kaj tial la voĉo de Dio hodiaŭ sonas al la homaro: “Ne per militistaro kaj ne per forto, sed per la radiado de mia vizaĝo en via korvarmo al ĉiuj kaj ĉio vi vidos la militon disruiniĝi kaj la sunbrilon de la paco lumi kaj varmigi antaŭ via piedo. Ĉar al tiu, kiu havas la radiadon de mia vizaĝo en siaj koro kaj intelekto, siaj menso kaj kondukmaniero, ne ekzistas la mallumo. Ĉio estas lumo, ĉio estas amo, ĉio estas ĝojo.”

Tradkuo Jens Stengard Larsen. El libreto n-ro 14-C. La kreado de la konscio



Kontoristo Grethe Birnkhart hejme ĉe Martinus en la Instituto



Pri Vakcinoj

de Martinus

Kara NN!

Koncerne vian demandon pri vakcinado kontraŭ poliomjelito, mi devas informi vin, ke ĉi tiu vakcinado, same kiel ĉiuj aliaj formoj de vakcinado, daŭre estas esencaj urĝaj rimedoj en la

disvolviĝo de la homaro. Sed ili estas dispozicioj kiuj, ĉar la homaro alie evoluas al iĝi imuna kontraŭ malsano, fariĝos tute superflujaj. Kaj la nuna situacio estas, ke multaj homoj jam atingis ĉi tiun imunecan kaj tial ne bezonas esti vakcinitaj, dum aliaj estas sendefendaj kaj inklinaj al malsanoj. Sed ĉi tiu imuneco ne povas esti antaŭvidita ĉe individuaj homoj. Kaj tial vi ne povas rekte identigi, kiu devus esti vakcinata kaj kiu ne devus esti vakcinata. Se homo subtenas la opinion, ke li ne volas esti vakcinata, tiam li riskas kontrakti la malsanon. Kaj en tia situacio, temus pri tio, ĉu ĝi estus "malpleja malbono", ne nur por li, sed ankaŭ por lia medio, kun kiu li estas ligita en sia destino, se li estus vakcinata kaj, sekve, estus evitata la malsano. Se li estus patro de familio aŭ ŝi estus patrino de unu aŭ pluraj malgrandaj infanoj, ne povus esti la "malpleja malbono", ke li aŭ ŝi ne volis esti vakcinata kaj, do, kontraktis la malsanon, mortis aŭ malvalidiĝis dum sia tuta vivo.

Se la gepatroj aŭ gardantoj de infano rifuzas esti vakcinitaj, kaj tiam la infano kontraktas la malsanon, fariĝas konstante handikapita aŭ eble mortas, Kiel ĉi tiuj respondeculoj pri la protekto de la infano sentus si mem? – Ĉu vi ne pensas, ke estus "malpleja malbono", se la infano estus vakcinata kaj tiel saviĝita de malsano kaj morto?

El historia vidpunkto oni devas ankaŭ kliniĝi antaŭ la fakto, ke vakcinado estis la sola rimedo de la homaro por venki kruelajn epidemiojn. Kiel la homaro estus venkinta ilin, se Dio ne permesis al ili malkovri la vakcinon? - Efektive, la tero povus esti tute senhomigita sen ĝi.

Tiam ni venas al la demando, ĉu estas ĝuste lasi bestojn suferi, aŭ eĉ lasi ilin mortigi, por ke homoj estu savitaj; sed ĉi tie mi devas respondi, ke ĉi tie estas, kiel en amaso da aliaj gravaj demandoj en la vivo, ia "malbono" negrave kion oni faras. Estas vero, ke estas "malbono" kiam bestoj suferas pro homoj, sed estas ankaŭ "malbono" ke homoj alfrontas epidemion ege mortiga, malfunkciiga kaj kruela. Se la morto de unu besto povas savi milojn da homoj de handikapo aŭ nenatura morto, ĉu ne estus la "malpleja malbono" lasi la beston morti? - Jes, eĉ se estus nur dek homoj aŭ nur kvin homoj, aŭ se ĝi estus nur unu homo, oni devus esti homo tre malbona kaj vana, se li ne pensus, ke la "malpleja malbono" estas la morto de la besto anstataŭ la morto de homo. Homo havas pli grandan amason da konscio kaj tial reprezentas pli grandan kvanton da vivo ol la besto. Sekve, ĝi povas, en pli granda mezuro ol la besto, servi la vivon aŭ esti ĝojo kaj beno por ĉiuj vivuloj. Ĉu ne estus, tial, la plej amema afero savi la plej grandan kvanton da vivo ol lasi ĝin sinki por savi la plej malgrandan, plej primitivan kaj vanan vivon? - Aŭ ĉu milionoj da homoj estu lasitaj por morti, kiam ili povas esti savitaj helpe de la vivo de tre malgranda nombro da bestoj? – Cetere, lasi vin vakciniĝi nur signifos mikroskopan perdon de bestaj vivoj, rilate al la giganta buĉado de milionoj da vivoj, kiun homoj trudas al bestoj por manĝado de viando. Manĝi bestan manĝaĵon, escepte de lakto kaj butero, estas centprocenta sanga. Ĉi tiu manĝmaniero servas al neniu necesa celo. Ĝi ne savas iun homon de nenatura morto aŭ handikapo, male, ĝi kondukas milionojn da homoj al malsano, sufero de diversaj specoj, handikapo kaj antaŭtempa morto. Al tio oni devas aldoni la mortigon de ĉiuj bestoj, kiujn la koncernaj homoj kaŭzis nepravigeble. Ĉi tie oni devas memori, ke estas absolute neniu esenca kondiĉo manĝi bestan manĝaĵon. Estas nur sekvo de la formoj de superstiĉo, kiuj hodiaŭ estas la plej granda malfeliĉo kaj falo de la homaro.

Kiam la vivmaniero de homoj estu tiel rafinita, ke ili ne havos koron por manĝi viandon kaj neniel povas mortigi vivajn estaĵojn, tiam ilia naturo estos tiel pura kaj psika, ke ili estos tute imunaj kontraŭ ĉiuj malsanoj, kontraŭ kiuj, hodiaŭ, ili povas esti protektitaj nur helpe de vakcinadoj.

Ĉu en via speciala kazo necesas aŭ ne poliomjelitvakcinado, kara NN, mi ne povas diri al vi. Sed nun mi donis al vi etan ideon pri la kosma strukturo de vakcinado, pri ĝia graveco ĝenerale. Mi esperas, ke vi kaj via edzino povas certe senti, kio estas la "malpleja malbono" en la propra situacio, ĉar nur tio povas esti la plej amema kaj tial la plej ĝusta afero por via filineto.

Kun la plej koraj salutoj.

Martinus.

Letero de Martinus la 21.04.1955. M30903



UEA aktiva ĉe UN

Aperis la septembra-oktobra numero de nia informilo, en tri versioj: Esperanto, angla kaj franca. Enestas raportoj pri

- UK-Aruŝo
- indiĝenaj lingvaj rajtoj
- esperantologiaj konferencoj en Afriko kaj Azio
- la okazinta en julio Esperanto-Tago.

Pionira gazeto, kiu savis nian lingvon de pereco

Antaŭ 135 jaroj, la 1-an de septembro 1889, en Nurenbergo aperis la unua numero de la unua Esperanta gazeto La Esperantisto. Legu la liston de la Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en septembro 2024, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto ĉe <https://sezonoj.ru/2024/09/septembro-12/>

Esperanto samrajta laŭ EU

Laŭ informo de Etsuo Miyoshi la departemento “Lernejoj kaj Multlingveco” de la Eŭropa Komisiono konfirmis, ke Esperanto estas samrajta kun aliaj lingvoj por la projektoj de Erasmus+ kaj Kreema Eŭropo. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe <https://sezonoj.ru/2024/09/europo-6/>



Telegramo

Fine de septembro 2024 al la Telegrama kanalo *Esperanto-novaĵoj* aliĝis 426 abonantoj. (https://t.me/esperanto_news). Ĝi nun estas la dua plej abonata Esperanta kanalo en Telegramo. Se vi uzas Telegramon kaj vin interesas novaĵoj pri esperantista agado, aliĝu al la kanalo *Esperanto-novaĵoj*. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2024/09/telegramo-2/>



Esperanto - la internacia mondlingvo - parto 2 el 3

de Ole Therkelsen


12. Esperantistoj estas denaskaj idealistoj

Laŭ Martinus la esperantistoj estas denaskaj idealistoj, ĉar li estis konvinkita ke la plimulto de la tutmondaj esperantistoj estas homoj al kiuj veraj toleremo kaj internacia sinteno estas io kunnaskita. (Kosmos n-ro 1/1939, paĝo 8).

13. Esperanto estas planlingvo kaj moderna Latino

Esperanto dekomence estas farita tute logika, regula kaj perfekta. Ĝi estas liberigita pri la mallogikeco, malregulaĵoj kaj malperfektaĵoj de ĉiuj naciaj lingvoj. Jam kiel bazlernejano Zamenhof havis vizion fari internacian lingvon, kiu estu ia moderna Latino.

En Esperanto tial 80 % de la vortradikoj estas latindevenaj, kaj Latino fakte jam en la mezepoko funkciis kiel internacia lingvo de teologoj kaj studentoj. Inter la ceteraj 20 % multaj vortoj estas el la ĝermanaj lingvoj, parto el la slavaj. Esperanto estas bazita ekskluzive sur vortoj el la hindeŭropa lingvofamilio. Kvankam lerni Esperanton do povas esti malfacile al ĉino aŭ japano, la praktiko tamen montras ke al ili estas multe pli facile lerni la plene regulan kaj perfektan Esperanton ol la neregulan kaj nelogikan lingvon anglan.




Kreante sian lingvon Zamenhof rigardis ĉiujn ekzistantajn internaciajn vortojn kiel trezorujon. La lingvo permesas pluan evoluadon per tio ke en Esperanto konstante estas akcepteblaj novaj vortradikoj, kiujn oni poste tamen uzados en tiuj kombinoj kaj laŭ tiuj manieroj kiuj konformas al la gramatikaj reguloj de la lingvo. En la ruslingva *Unua Libro*, prezentita en la cara Rusio en 1887, troviĝas la 16 bazaj gramatikaj reguloj, kiuj konsistigas la fundamenton de la lingvo. Kiel oni ofte diras, “La Fundamento de Esperanto estas netuŝebla”. Pro tiu fakto Esperanto estas tre preciza kaj tre stabila lingvo. Novajn vortradikojn oni ĉiam povas enpreni, se oni nur provizas ilin per la ĝustaj finaĵoj konforme al la 16 gramatikaj reguloj. Sed ekster tiu fundamento la lingvo estas lasita libera al la kre-kapablo de la uzantoj, kaj Esperanto entute estas donaco de sia kreinto al la tuta mondo. Analoge kun tio, ankaŭ la Kosmologio de Martinus estas lasita libera al la homaro, kiel senkondiĉa donaco al la tuta terĝlobo.

La dana lingvosciencisto Rasmus Rask (1787-1832) difinis, kiel evidentiĝas el liaj manuskriptoj en la Reĝa Biblioteko en Kopenhago, la principojn por la kreo de la ideala lingvo, kaj ili tute kongruas kun la principoj de Esperanto. Kiel malgranda diferenco povas esti menciite ke Rask proponis ke adjektivoj ne havu fleksion, dum Zamenhof preferis ekzemple ke adjektivoj havu

singularan kaj pluralan fleksion kaj malsamajn finaĵojn laŭ tio.

Ankaŭ iuj nemultaj filozofoj okupiĝis pri la penso ĉu eblas fari la perfektan lingvon, la lingvon finfaritan. Tra la historio diversaj homoj faris preskaŭ 1000 planlingvojn aŭ lingvoprojektojn, kaj el ili nur unu, nome Esperanto, montriĝis vivkapabla.



14. Ĉu Esperanto ne estas morta kaj teknika lingvo?

Malkiel Latino, Esperanto estas treege simpla kaj facile lernebla. La kaŭzo ke ĝi estas tiel facile lernebla, estas ke ne ekzistas malregulaĵoj en la lingvo. Sed tiu simpleco ne signifas ke ĝi estas malpli esprimkapabla ol la ekzistantaj naciaj lingvoj: Tion kaŭzas la fakto ke Esperanto enhavas grandan aron da lingvaj elementoj, logike kaj libere kombineblaj al novaj vortoj, kio je altega grado pliigas la esprim-eblecojn. *Esperanto tial estas pli esprimkapabla ol iu hodiaŭ ekzistanta nacia lingvo de la tero.* Esperanto estas uzata de post 1887, kaj montriĝas ke ĝi funkcias kiel natura lingvo, kie oni povas esprimi sin ankaŭ en belestro kaj poezio.

Esperanto estas matematike, logike agordita lingvo, per kiu oni povas, same kiel per matematike, logike agorditaj pianaj kordoj, esprimi ĉiajn sentojn. Tio ke la tonoj estas matematike agorditaj inter si, ne malhelpas la eblecon esprimi sin emocie ĉe la piano. Estas antaŭjuĝo aŭ miskompreno ke oni ne povas esprimi sentojn en Esperanto, pro tio ke ĝi estas matematike, logike konstruita kaj agordita – analoge al la pianaj kordoj. Male ĝi pro la perfekta konstruo fariĝas eĉ pli bona ilo por esprimi sin precize kaj nuance. Oni povus diri ke *paroli nacian lingvon estas kvazaŭ ludi per misagordita piano, dum paroli Esperanton estas kvazaŭ ludi per piano bone agordita.*

En Esperanto kiel dirite estas multaj internaciaj vortoj, kaj ĉiuj vortradikoj estas elektitaj el ekzistantaj naturaj lingvoj. Tial la vortoj de Esperanto ne estas teknikaj aŭ mortaj, sed havas vivon kaj la saman mitologian ŝarĝon kiel en la ceteraj lingvoj. Ekzemploj povas esti “diablo”, “Dio”, “mondo” – kaj dano povas miri ke ordinara vorto kiel “flagstango” estas “flagstango”! – La originalaj danaj titoloj *Livets Bog* kaj *Det Evige Verdensbillede* signifas *La libro de la vivo* respektive *La eterna mondbildo*.

15. Esperanto estas natura lingvo – se iu iam dubis pri tio !

Esperanto estas planlingvo. Teoriaj kaj sistemaj priskriboj de planlingvoj apenaŭ ekzistas, sed la brita lingvisto John Wells en sia libro *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* priskribis Esperanton per tiuj metodoj, sistematiko kaj terminaro, kiujn oni aplikas en la moderna lingvistiko. Ĝi ekzistas en pluraj nacilingvaj versioj, ekzemple *Esperanto lingvistisk set*.

Wells montras sur lingvistika bazo ke Esperanto estas natura lingvo, do oni povas nur bedaŭri ke Esperanto plej ofte estas nomata artefarita lingvo. Erik Hansen, eksa profesoro ĉe la Universitato de Kopenhago, skribas en la antaŭparolo interalie: “... estas klare montrite ke *Esperanto estas lingvo, natura lingvo – se iu iam dubis pri tio*: oni ĉie trovas strukturojn kaj fenomenojn kiuj troviĝas en la naciaj lingvoj.”

16. Kion oni sentas lernante Esperanton?


Jam en la lernejo multaj perdas la lingvolernemon, ĉar oni facile perdas la memfidon kiam oni faradas erarojn, kio ofte okazas kiam la lingvoj estas malfacilaj, malregulaj kaj nelogikaj. Sed al la plimulto la lernado de Esperanto estas travivado de sukceso, ĉar oni sentas sin pli sekura pro la regula strukturo de la lingvo.

Studoj de infanoj, kiuj frue lernis Esperanton, montras ke ili estas pli kreemaj esprimante sin en Esperanto ol en la gepatra lingvo, ĉar Esperanto kun siaj multaj kombinebloj kaj libera strukturo invitas novajn konstruojn kaj kreadon.

Multaj regajnas la emon lerni lingvojn travivante sukcesan lernadon de Esperanto. Oni ja ankaŭ plilertiĝas pri gramatiko, kvazaŭ per ia natura metodo, ĉar ĉiu vorto en Esperanto portas gramatikan signon, kiu rivelas pri kia vorto temas. Se vorto en la angla finiĝas per la litero -s, tio povas esti substantivo en pluralo, sed ankaŭ prezenca verbo en la tria persono singulara, adjektivo, adverbo aŭ io kvina. En Esperanto la finaĵo -o estas rezervita por substantivoj, -a por adjektivoj, kaj ekzemple -is, -as, -os por verboj en respektive preterito, prezenco kaj futuro. Ĉiu vortoformo aŭ vortoklaso tiamaniere havas sian propran gramatikan signalon.

La plej multaj kiuj lernas Esperanton, je iu momento eksentas enorman inspiron kaj ĝojon lernante la lingvon. Oni sentas sin feliĉa kaj preskaŭ “savita”, kvazaŭ eklipsus onin la “sankta spirito”. Tio eble sonas tre religie, sed al Martinus la “sankta spirito” estas la sama kiel la spirito de vero, kaj li sekve esprimas la nunan teran sciencon kiel “la sankta spirito en embria stato”. (Logiko, ĉap. 30 kaj 66, LB1 par. 180).

Martinus ankaŭ difinas arton kiel “altintelekteco enkarniĝinta en materio” (LB4 par. 1150). Kiam la universalaj veroj de la vivo estas esprimataj en arto, tio ja ankaŭ estas la spirito de la vero, enkarniĝanta en la materion, en literaturo, muziko, pentrado, skulptado, kantado, teatro, baledo, kino, foto ktp. Imagu kian ĝojon travivadis homoj per ekzemple muziko kaj literaturo. La eŭforia feliĉo kaj ĝojo kiun oni travivas en arto kaj religio renkontante la spiriton de la vero, oni povas sperti ankaŭ lernante Esperanton, ĉar ĝi estas bazita sur diaj principoj. Ĝi estas kiel arto – altintelekteco enkarniĝinta en materio.



17. Kial estas tiel granda skeptikeco al Esperanto kiel monda lingvo?

Granda parto de la rezisto kontraŭ Esperanto ŝuldiĝas al nescio. La plej multaj el tiuj kiuj esprimas sin kontraŭ Esperanto kiel mondlingvo, mem ne lernis Esperanton, kaj tial la argumentoj ofte estas bazitaj sur antaŭjuĝoj kaj antaŭfiksataj opinioj anstataŭ sur lingvosciencaj faktoj.

Multaj homoj serĉas la kaŭzon de la ankoraŭ modesta disvastiĝo de Esperanto en la lingvo mem, en ĝiaj strukturo kaj konsisto. Sed la kaŭzo ne estas mankoj de la lingvo, sed la egoismo, grega konscio kaj naciismo de homoj.

La naciismo donas multe da ĝojo kaj inspiro en iuj evolu-ŝtupoj, sed en la estonteco ĝin anstataŭos la ĝojo de internacieca sinteno. Multaj homoj hodiaŭ troviĝas sur evolu-ŝtupoj kie ili ja eble havas pli nacian ol internacian sintenon. Tre malmultaj pretas rezigni pri sia nacia lingvo favore al senpartia, perfekta internacia lingvo.

Laŭ kosma vidpunkto la naciismo estas esprimiĝo de la memintereso aŭ egoismo de la

unuopa nacio, dum internaciismo estas esprimiĝo de la ne-memcelado aŭ malegoismo de la nacio. Sed sekvante la tutteran evoluon oni povas konstati la evoluon de la internaciismo, observante ke la memcelado de la nacioj malkreskas, dum kreskas ilia ne-memcelado. (LB1 par. 100).



© Martinus Idealfond 1936

Reg. 42

18. Ĉu la angla estos la mondlingvo?

Ĝenerale oni povas diri ke neniu ekzistanta nacia lingvo estos la lingvo de la tutmonda ŝtato, pro du esencaj kaŭzoj: Unue estus partia solvo elekti nacian lingvon, due ĝi estus solvo nekompleta, ĉar ĉiuj naciaj lingvoj estas malregulaj kaj nelogikaj.

Estus nejusta aŭ partia solvo se la angla iĝus la mondlingvo. Se la angla iĝus la monda lingvo, al la cetera loĝantaro de la tero estus trudata la angla kaj usona kulturoj. Anglalingvuloj tre facile trovos laboron kiel sekretarioj, tradukistoj kaj lingvoinstruistoj, dum la impostopagantoj de aliaj landoj devos pagi miliardojn al lernejoj kaj instruistoj pri la angla lingvo, por ke iliaj infanoj lernu la anglan.

Hodiaŭ la angla funkcias kiel internacia helpa lingvo, kaj tio havas la avantaĝon al Esperanto ke ĉiuj popoloj de la tero grade lernas la saman alfabeton kaj multajn el la latinidaj vortoj kiuj troviĝas kaj en la angla kaj en Esperanto. Tiamaniere la nuna disvastiĝo de la angla lingvo estas granda helpo kaj avantaĝo al Esperanto. La angla reale ne estas konkuranto, sed male helpa motoro en la disvastigo de Esperanto!

Eĉ se iun tagon ĉiuj homoj de la tero parolos la anglan, tamen penindus ĝeneraligi Esperanton, malgraŭ la transiraj malfacilaĵoj. Kostas tiom da tempo ellerni la multajn, kosme senvalorajn, malregulaĵojn kaj nelogikajn elementojn de la angla lingvo, ke atentante la lerneajn infanojn de la estontaj jarcentoj oni tamen profitus transirante tute al Esperanto, kiu estas perfekta lingvo. Esperanto estas analoga al la perfekta dekuma sistemo, kiu ne estas plibonigebla. Se oni imagus ke ĉiuj homoj de la tero uzus la saman cifersistemon, la romajn ciferojn, konsidere al la estontaj generacioj indus transiri de la romaj ciferoj al nia nuna perfekta cifera sistemo kun la nulo – ankaŭ se tio donos iom da ekstraj malfacilaĵoj dum la transira periodo.

Multaj danoj fervore favoras ke la angla fariĝu mondlingvo, sed tiurilate oni ja devas memori ke tio estas avantaĝo al la danoj ĉar la dana lingvo tiom ege proksimas al la angla. Multe pli malfacile estas al rusoj kaj ĉinoj ellerni la anglan. Sed eĉ dano post dek jaroj da studoj de la angla lingvo ne povos bone traduki libron el la dana en la anglan.

La koncepto “egaleco” tre grave rolas kadre de la tuta problemaro de unu komuna monda lingvo. Kiel dirite, solvo nejusta kaj partia estus elekti nacian lingvon kiel mondan, sed krome estas tiel ke tiuj naciaj lingvoj kiuj akiris la plej grandan disvastiĝon en la mondo, tion gajnis ĉar iu

grandpotenco per agresado, milito kaj konkeroj subigis aliajn popolojn. Ĉu ne Latino gajnis disvastiĝon danke al la militismo kaj imperiismo de la roma regno? – Ĉu ne la hispana kaj la angla ricevis grandan disvastiĝon sammaniere? – Esperanto male disvastiĝos sur libervola kaj idealisma bazo per homoj kiuj favoras pacon, egalecon kaj amikecon.

19. La rolo de la nulo en la perfekta cifera sistemo kaj en la perfekta lingvo

La genieco de la dekuma sistemo estas la nulo, kontraste al la primitiva roma sistemo sen nulo. Mi apenaŭ povas imagi kiamaniere oni multiplikis kaj dividis per romaj ciferoj. Kiam alvenis en Eŭropo la tiel nomataj arabaj ciferoj, kiuj originas en Barato, daŭris ne malpli ol 400 jaroj ĝis tuta Eŭropo havis la ciferan sistemon kiun ni havas hodiaŭ, kaj kiun la tuta mondo adoptis. Tial oni ankaŭ devas atendi grandan inertecon en la enkondukado de Esperanto kiel monda lingvo.

Martinus skribas ke nur kiam oni kapablos uzi la lingvan alfabeton en maniero same perfekta kiel tiu en kiu oni nun uzas la ciferan sistemon, la lingvo estos finevoluigita kaj perfekta. (LB3 par. 1051).

Martinus multe skribis pri la analizo de la nulo (LB3 par. 1010-1032). La nulo estas tio kio perfektigas nian ciferan sistemon. (Vidu la ĉi-sekvajn par. 12.6, 12.19). Ĉi tie altrudas sin la demando, kiel do enkonduki la nulon en la lingvon same kiel en la ciferan sistemon?

En Esperanto tio okazas per tio ke ĉiu vortoklaso havas difinitan literon kiel finaĵon. Ĉiuj substantivoj finiĝas per -o, kiel ekzemple *vivo* kaj *vero*. La 0 de la cifera sistemo respondas al la o de la substantivoj. Antaŭmetita nulo en la cifera sistemo esprimas ion ne manifestitan, dum postmetita nulo enestas kiel nombra unuo same kiel la ceteraj naŭ ciferoj. (Vidu poste par. 12.28). Izolite la finlitero -o de la substantivo same kiel la antaŭmetita nulo esprimas ion ne manifestitan, nome nemanifestitan substantivon. (LB3 par. 1010, 1023). Sed la litero o ekhavas signifon en rilato kun aliaj literoj, same kiel la nulo ekhavas signifon kiel nombra unuo rilatante kun aliaj ciferoj.

La 0 de la cifera sistemo respondas al la a de la adjektivoj. Ĉar la lingvo estas pli komplika afero ol la cifera sistemo, ekzistas pluraj “nuloj” en la perfektaj lingvoj, sed ĉiuj kun principo la sama rolo. Ĉiuj adjektivoj finiĝas per -a, kiel ekzemple *viva* aŭ *vera*. Se oni prenas la sumon de ĉiuj nombroj negativaj kaj pozitivaj, oni ricevas 0. Se oni prenas la universan sumon de ĉiuj elektraĵoj pozitivaj kaj negativaj, oni ricevas 0. Se oni prenas la sumon de ĉiuj adjektivoj, longa-mallonga, malvarma-varma, juna-maljuna ktp., oni ankaŭ ricevos ion kio respondas al la 0 de la cifera sistemo, nome la finlitero de la adjektivoj -a. Izolite ĝi esprimas ion ne manifestitan, nome nemanifestitan adjektivon, same kiel izolita nulo esprimas nemanifestitan nombron. (LB3 par. 1032-1033).

Kiel adverboj la du supraj ekzemplaj vortoj estas *vive* kaj *vere*, ĉar ĉiuj adverboj finiĝas per -e. La 0 de la cifera sistemo respondas al la e de la adverboj. Ĉiuj vortoj kiuj en Esperanto finiĝas per -e, estas adverboj. Tio iom respondas al tio ke ĉiuj paraj nombroj estas divideblaj per du, aŭ ke ĉiuj nombroj kiuj finiĝas per 0 aŭ 5 estas divideblaj per 5.

Se entute havas ian sencon, oni povas libere en matematika aŭ kombina maniero ŝanĝi la vortoklasojn de iu ajn radikvorto. Per tio Esperanto ankaŭ ekhavas grandan similecon al la cifera sistemo. Kiel indikite supre, la principo perfekta lingvo Esperanto enhavas danke al la difinita finlitero de la vortoklasoj ankaŭ tiun nulon, kiu kunhelpas perfektigi nian cifersistemon. Pli detala klarigo transpasus la kadrojn de ĉi tiu libro. Mia aserto estas nur tio ke Esperanto teorie kaj principo estas perfekta lingvo same kiel la nuna cifera sistemo, kiu estas tute perfekta sen mankoj kaj eraroj. Esperanto plene kontentigas la kriteriojn kiujn Martinus starigas al la perfekta lingvo.

20. Ĉu la naciaj lingvoj iom post iom malaperos kaj anstataŭe estos unu sola lingvo?

La angla ĝuste nun funkcias kiel internacia helpa lingvo, sed ĝi neniam estos gepatra lingvo al francoj, germanoj, rusoj kaj ĉinoj. Kontraŭe, estonta perfekta homaro sur la tero havos komunan perfektan mondan lingvon, kiu estos gepatra lingvo de ĉiuj homoj sur la tero.

Tiu monda lingvo anstataŭos ĉiujn ekzistantajn naciajn lingvojn, kaj per tio la fenomeno de tradukoj estos definitive nuligita, sekve de kio oni tutmonde spertos la grandan ĝojon ke ĉiuj povas kompreni ĉiujn. La naciaj lingvoj de la mondo nature formortos, tute malrapide kaj grade, same kiel

la diversaj dialektoj formortadas en Danio.

Multaj opinias ke estas ja terura penso ke la naciaj lingvoj kaj dialektoj formortos, sed memoru la milojn da lingvoj kiuj jam formortis! – Kiel multege da malsamaj lingvoj ni ne parolis dum la evoluado, kiel ŝtonepokuloj, primitivaj naturhomoj, simi-homoj, simioj, pavianoj kaj hundoj? – Kiel kaj kial ĉiuj tiuj primitivaj kaj neperfektaj lingvoj estu konservataj en arkivoj ĉi tie en nia fizika mondo? – Kiucele oni plenigu unu arkivon post la alia, unu domon post la alia per registraĵoj de tiu tuta primitiva parolado kaj blekado?

21. La multaj dialektoj kaj formortantaj lingvoj tamen ne tute perdiĝos

Eble konsule al iuj, Martinus atentigas ke ni en estonta evolua ŝtupo en la beata regno kun kulminanta memoro povos retravivi ĉiujn tiujn lingvojn kiujn ni parolis en la pasinteco, sed kiuj perdiĝis sur ĉi tiu tero pro la pasado de la evoluo. Tio baziĝas sur la fakto ke ĉiu travivaĵo faras impreson kaj metas postsignon. Se travivaĵo estus neregistrebla de la travivanto, ja travivaĵo estus absurda fenomeno. La impresado konserviĝas en la konscio danke al la memorenergio. Ĉiufoje kiam ni ion travivas, konserviĝas kopio de la travivaĵo, proksimume kiel oni faras foton. Memoro estas kopio de travivaĵo. Aparte konserviĝemajn memorojn Martinus nomas “oraj kopioj”. (LB1 par. 212-219).


22. La tuta homaro de ĉiu ajn planedo fine parolos unu saman lingvon

En demanda leciono Martinus diris ke “kiam la tero estos unu ŝtato kun ununura lingvo, multe da tempo estos gajnita, ĉar oni ne bezonas tradukojn kiam ĉiuj komprenas ĉiujn”. (Kosmos n-ro 8/2009).

Laŭ Martinus la terglobo estas vivanta estulo evoluanta – same kiel sennombre multaj aliaj planedoj de la universo. Planedoj evoluas same kiel homoj, kaj same kiel oni povas diri ke kiam ĉiu infano estas dujara, ĝi jam maturas por lerni paroli, tiel ankaŭ al ĉiu planedo-estulo estas difinita aĝo aŭ difinita evolu-ŝtupo kiam ĝi maturas lerni paroli pure, kio signifas ke ĉiuj homoj de la planedo parolos la saman lingvon.

En la evoluado de ĉiu planedo-estulo al perfekteco, ĝia tuta, perfekta homaro tial je iu okazo parolos komunan, perfektan mondan lingvon. Kvankam la angla jam funkcias kiel internacia helpa lingvo, ĝi ne estos la fina solvo de la lingva problemo de ĉi tiu planedo, same kiel neniu alia neperfekta nacia lingvo povos fariĝi monda lingvo sur alia planedo kun perfekta homaro.

Martinus diras ke perfektaj homoj ne kontentiĝos per lingvo ne perfekta. Perfektaj homoj en mondo perfekta deziras perfektan mondlingvon.



Simbolo n-ro 26, La venonta perfekta homregno

23. Kiam Esperanto estos la lingvo de la estonta monda ŝtato?

Esperanto ŝajnas esti tiu internacia lingvo kiu povos solvi ĉiujn lingvoproblemojn de la planedo, iĝante la lingvo de la estonta monda ŝtato. Esperanto reprezentos solvon kaj nepartian kaj perfektan.

En la formiĝo de EU kaj UN kaj en la kreskeganta tutmondiĝo aŭ internaciigo ni vidas kiel

tiu nova mondregno jam montriĝas esti kreigiĝanta. En 1932 Martinus skribis ke la “Ligo de Nacioj”, fondita en 1920 tuj post la unua mondmilito, estu rigardata nur kiel plej unua embrio de la formiĝo de tutmondaj aŭtoritato kaj justico. (LB1 par. 98-101).

La formiĝo de vera internacia monda aŭtoritato estos realaĵo ĉi-planede post ĉirkaŭ 500 jaroj. Multaj kredas ke Esperanto malprosperas aŭ malsukcesis ĉar oni eble nun ne aŭdas tiel multe pri ĝi, sed tiurilate oni devas atendi ke kredeble pasos 200-300 jaroj ĝis Esperanto ludos pli gravan internacian rolon, kaj eble 500 jarojn ĝis ĝi estos la oficiala lingvo de la monda ŝtato. Post dumilo da jaroj oni kredeble devas kalkuli ke la naciaj lingvoj estos mortantaj, same kiel la diversaj dialektoj en Danio nun formortas.

Tio kio havu grandan daŭremon same kiel la kverko devas kreski malrapide, opiniis Martinus. La rapide kreskanta fazeola tigo ne daŭras tiel longe kiel la kverko, kiu povas aĝiĝi pli ol 500 jarojn. Samkiel la ĝermoplanto de kverko, Esperanto same kiel la kosmologio tute malrapide kaj sekure kreskas sur tiu ĉi terĝlobo. Se oni komparas kun la kreskado de la kristanismo dum la unua tempo post Jesuo, oni vidos ankaŭ ke daŭris pluraj jarcentoj ĝis la kristanismo sukcesis fariĝi ŝtata religio en nur kelkaj unuopaj landoj.

Laŭ tiu vidpunkto la internacia lingvo Esperanto havas grandajn kaj vastampleksajn perspektivojn.

En sekva numero daŭrigo kaj fino en parto 3 el 3

* * *



Mischa Lim, Eva, Sam Zinlgersen, Peter Zacho, Birthe Zacho Lapenna, Ivo Lapenna kaj Martinus en Restoracio Lorry, Pile Allé 7, Kopenhago en oktobro 1961

Ivo Lapenna forpasis la 15-decembro - La naskiĝtago de Zamenhof

de Ole Therkelsen

IVO LAPENNA naskiĝis en Split (Dalmatio, Jugoslavio) la 5-an de novembro 1909 en. Li studis juron en Split kaj Zagreb, en 1932 li diplomiĝis kaj en 1933 li doktoriĝis. Ekde la fino de 1949 Ivo Lapenna rezidis ekster Jugoslavio. Unue li estis en Parizo kaj ekde la mezo de 1951 en Londono, kie li poste fariĝis brita ŝtatano. Lapenna estis kunfondinto de Studenta Esperanto-Klubo (poste Akademia Esperanto-Klubo) en la Universitato de Zagreb en 1929, kaj ĝia prezidanto ĝis aprilo

1941; prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo de 1937-1950; komitatano kaj estrarano de IEL (ekde 1947 UEA) de 1938-1974; ĝenerala sekretario de UEA de 1955-1964; prezidanto de UEA de 1964-1974; membro de la Akademio de Esperanto ekde 1952; kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980 ekde tiam ĝia prezidanto; membro de la redakta komitato de la internacia kultura kaj informa revuo *Horizonto* kaj ĝia ĉefa kunlaboranto. En 1977 li pensiigis, kaj la 15-an de decembro 1987 li forpasis en Kopenhago, kie li estas entombigita en Rødovre Kirkegård. Ĉu ne estas pensige, ke Zamanhof naskiĝis ankaŭ la 15-an de decembro? – Oni povas detale legi pri la biografio de Ivo Lapenna (1909-1987) en *Horizonto* n-ro 6/1984. (Eldonanto Peter Zacho, 1911-1991). Ivo Lapenna-hejmpaĝo: interesaj dokumentoj, bonaj paroladoj kaj historiaj fotoj ktp. [Jen la adreso: www.ivolapenna.org](http://www.ivolapenna.org)



La tomoŝtono de Ivo Lapenna en Rødovre Kirkegård

Rezolucio de la 109-a Universala



Kongreso de Esperanto, Aruŝo, Tanzanio

La 854 kongresanoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), venintaj el 65 landoj al Aruŝo, Tanza-nio, inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 2024 traktis la temon "Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo". La partoprenantoj de la kongreso ne nur diskutis la temon, sed samtempe prezen-tis modelon por pli bona mondo, en kiu homoj el multaj diversaj landoj povas pace kunvivi kaj interkomuniki sen tradukistoj per la internacia lingvo Esperanto, kiun ĉiuj kongresanoj parolas.

Kun ĝojo la partoprenantoj konstatas, ke ĉi tiu unua Universala Kongreso en Afriko plene sukcesis. Ĝi pruvis, ke en Afriko la movado por neŭtrala internacia lingvo, nome Esperanto, estas vigla; ke ĝi aktivis en multaj landojde la afrika kontinento; kaj ke la afrikaj esperantistoj liveras valoran kontribuon al la universaleco de la tutmonda Esperanto-movado. Kun sama ĝojo la partoprenantoj observas, ke multaj junaj homoj en afrikaj landoj lernas Esperanton en kursoj kaj ke en multaj afrikaj landoj estas planite organizi pli da kursoj por ebligi al pli da homoj personajn internaciajn kontaktojn per Esperanto.

La kongresanoj alvokas ĉiujn homojn protekti la medion, ĉar sana medio estas antaŭkondiĉo por atingi la celon konstrui pli bonan mondon. Ili alvokas ĉiujn homojn de la tero konsideri utiligi dum vojaĝoj transportilojn, kiuj konsumas malpli da energio, prefere el daŭripovaj fontoj kiel suno aŭ vento, kaj kunlabori por kompensi la emision de forcejaj gasoj, kiam ankoraŭ ne eblas tion eviti.

La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, responde al la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo.

Por tutmonda interkompreniĝo necesas komuna neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiu homo povu paroli apud sia gepatra lingvo. La kongresanoj konstatas kun ĝojo kaj fiero, keankaŭ en tiu ĉi kongreso evidentiĝas, ke Esperanto plene taŭgas por tiu celo. (Redonita laŭ permeso de Revuo Esperanto 2024).



Informado pri la Martinus-instituto

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton.

La disvastiĝo de la konoj pri la Kosmologio de Martinus okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto Mariendalsvej 94-96

DK-2000 Kopenhago

Tel: (+45) 3838 0100 Telefotempo: lundo-ĵaŭdo 12-16 DK p.ĝiro 642-9580

www.martinus.dk, esperanto@martinus.dk, shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen. Kompostado: Jonas Dalmose.

Kopirajto: © Martinus Institut Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

Presita de Martinus Institut ISSN 1600 4116.



SENPAGA EO-KOSMOS

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikiĝos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo.

Rete kaj retpoŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron.

Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Martinus-Instituto
Mairendalsvej 94-96,
DK-2000 Frederiksberg,
Kopenhago,
Danio